

Christian Morgenstern,  
 Por konsoli amikon pri lia am-aflikto

*tradukita de Willy Nüesch*

Ni devas ree renkontiĝi ĉiam  
 kaj suferadi unu per l' alia,  
 ĝis ĉion tion ĉi ni benos iam.

En tiu tago la sufer' foriĝos,  
 sufer' almenaŭ, kiun blinda teksis,  
 kaj kiu nin arbar-en-ŝtorme fleksis.

En novan celon ni kaj vivon tiam  
 kiel riveroj en la mar' kunfluos,  
 kaj plu nenia apartiĝ' nin skuos.

Finfine tiam la "...ne serĉas sian"  
 en niaj koroj kiel ver' sin ankros.  
 Kaj al ni forto kaj feliĉ' ne mankos.

*Traduko de la Germana poemo "Einen Freund über seinen Liebeskummer zu trösten" de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, \*1927-05-09).*

*Arg-71-139 (2013-08-28 18:39:29)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.bl0rg.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.*